

# PENSEO

N-ro 360

okt. / 2021

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

**Maria Nazaré Laroça (Brazilo)**



## Parfumo el infanaĝo

Kun granda plezuro  
mi vidas aŭguste  
la manaka'-arbo  
en la najbara ĝardeno,  
tiel fieran kaj simplan!

Kaj ĝi memorigas min  
pri alia sama arbo,  
kiu parfumis al mi  
la tutan infanaĝon  
ĉe l' kanto jena:  
Trans tiu monteto  
manaka'arb' staras,  
geedziĝu ni, kaj iru tien!  
Ĉu vi? Ĉu vi?

*Juiz de Fora, 31/08/2021.*

## Koloroj

*Al Mark Twain*

Flamo, fajrer' etera',  
Anim' ne havas koloron!  
kantas poeto Chico César.

Ni sentas la saman doloron,  
kaj kun nigra haŭto,  
kaj blanka aŭ flava!

En ĉi tiu bunta mondo,  
la saman feliĉon tamen  
nur per Amo ni trovas.

*Juiz de Fora, 25/08/2021.*

## REVENO

Ĉi-dimanĉe matene,  
mi akceptis la inviton de l' ĉielo,  
safirblua ŝvebanta lago,  
kaj foriris el la hejmo sola.

Mi kunportis kuraĝon  
kaj bastonon celante  
promenon sur la placo  
ĉiam bonveniga.


De tempo al tempo mi haltis  
por admiri la poezion  
de l' koloraj nervuroj  
de seka folio surgrunde ...

L' arto ekzistas  
por ke la realo  
ne nin detruu,  
tion diris Nietzsche.

La naturo ekzistas  
por ke mia humaneco  
sin rekonstruu.

*Juiz de Fora, 22/08/2021.*

**Tiberio Madonna (Italio)**



## Bildkarto

Mi volintus ekspedi  
bildkarton de Ĝenovo  
al mia patrino.  
En Paradizon.

Poste mi ekpensis

ke l' Paradizo  
ne ekzistas.



## Rita Mkrtchyan (Armenio)



Pripensas kaj ofte parolas  
Pri sento de la nostalgi',  
En "mar" virtuala grandega  
Ŝanĝiĝas ni daŭre pli.  
La temp' iĝis "nigra", alarma,  
Sed nia protestas anim',  
Ektuŝas pentraĵoj belegaj  
De bunta natur' harmoni'.  
Ni ĝuas poemojn kaj kantojn  
La ĝoj' nur, neniŭ envi',  
Silentas, se ege diversas  
Konkludoj kaj la opini'.  
Ekscias pri ĉiuj novaĵoj  
En viv', en ĝarden', en domet',  
Malsame ni ĉiuj reagis,  
Kutime grimacas i-ret'.  
Informoj pri la ŝatokupoj,  
Pri sano, labor', famili',  
Komprenas, ke en nia mondo...  
Solecas ne nur mi kaj vi.

lasu min dormi  
lasu min sonĝi  
mian plej dolĉan sonĝon  
nur unu minuton  
vŝŝŝ-spir-ronke  
la somera pluveto  
karese frapetas  
la dormoĉambran fenestron  
en la matena krepusko  
nur unu minuton  
vŝŝŝ-spir-ronke  
lasu min turni  
por brakumi kusenon  
nur unu lastan fojon  
en la molega kuŝejo  
nur unu minuton  
vŝŝŝ-spir-ronke  
lasu min  
lasu min dormi  
lasu min sonĝi  
nur unu minuton  
eble du pluajn aŭ tri  
tintas tin-tine!  
ho, ne ...  
tintas tin-tine!  
ho, ne ... ĉu vere?  
tintas tin-tine!  
ho ... ĉu vere tiel?  
tintas tin-tine!  
vere tiel malfrue?  
nun restas nur ...  
nur unu minuto!

## Jan P. Sandel (Germanio)



*Nur unu minuto*

vŝŝŝ-spir-ronke  
lasu min  
lasu min do  
lasu min dormi  
nur unu minuton  
vŝŝŝ-spir-ronke  
lasu min

## Wally du Temple (Kanado)



*Linko, Indiana Fonto de Sekretoj*

Se volas trovi sekreton, imagu linkon  
Kato sekretema; hartufigas orelpinton  
Granda Silento, klarvidulo tempe kaj space  
Malkaŝanto de mensaj bildoj montre kaj  
trance

Sekvu sub la firmamento suprojn de indiko

La ĉeeston; per viaj oreloj sentu per mimiko  
En nigra nokto atentu, tenu ilin pinte!  
Promesu bonagojn kaj sekretoj venos salte

Linka kuracilo ekvenos el la kamuflo!  
Aŭskultu silente voĉon ĉe orelotufo  
Timojn, mensogojn, ignoru; estu vi tre lerta  
Kiam aŭdiĝas linko el arbaro aperta

## Kastoro, Avataro por Konstruantoj

Kastoroj, famaj farantoj de besta regno  
Instruas pri multporda akva doma desegno,  
Konservi alternativon, tiel malfermata  
Estu ĉiam eliro preta, kaj ne blokata.

Loĝejoj en kaj el akvo, ŝajne amfibiaj,  
Preskaŭ flosantaj por familioj senfobiaj.  
Montras fortan emocion de la familio.  
Geedza paro teama, alta harmonio.

Patrino kaj patro dolĉe trunkojn maĉas  
Akraj dentoj science branĉetojn tekse tranĉas.  
Padelvostojn navige svingas geedza paro,  
Post atingosento de sukceso, jen riparo.

Ĉiu scias kiel kompletigi la laborpecojn  
Kiu apartenas al si, honoras talentojn.  
Tiaj domoj estas fortaj muroj, kiel digoj  
Kreas lagojn, marĉojn por akvobirdoj kaj  
pigoj

**Ángel Arquillos López (Hispanio)**



## Mi plenumis la promeson

Mi plenumis la promeson  
reveni en nian hejmon,  
sed en ĝi regas mistero  
kun malagrabra atmosfero  
kaj kun fermitaj fenestroj.  
Mi plenumis la promeson  
kaj kun timo mi konstatas

ke jam vi ne plu revenos...  
Vi forflugis inter nuboj  
al la senfina ĉielo,  
kie loĝas senkorpuloj  
spiritoj kaj anĝeloj.  
Mi plenumis la promeson,  
sed la pezo de la grundo  
estas forta bariero  
kaj mia korp' elĉerpita  
ne plu trapasos la teron.

## Kiu vokas min ?

Kiu vokas min  
de l'pasinteco?  
Mi la vortojn  
ne distingas,  
embarasita mi estas  
kun mia mens'  
kortuŝita,  
ĉar mi sidas  
sur la kanapo de l'vivo  
meditante  
pri malĝojo  
kaj feliĉo,  
sed la voĉo  
de l'pasinto  
daŭre vokas  
kun insisto  
kaj petegas mian helpon.  
Kion fari?  
Kie estas la paseo?  
Kie estas la mistero?  
Mi tre solas  
sur la kanapo de l'vivo,  
mi deĵoras  
kaj atendas la momenton,  
retrovi la pasintecon  
kaj rekuperi la vivon.



## Joaquim Lagartixa (Portugaliao)



### Naturejo

Mi ŝatas arbojn  
sur kies trunkoj  
oni enskribas  
diversajn nomojn;  
kaj kies branĉoj  
ventopelataj  
onde moviĝas susure lantaj;  
kaj mi ektuŝu  
per la vizaĝ'  
zefirmisteron  
de arbarmiraĝ'

### Somere

Kia ĝoj'!  
Somero estas tempo de feliĉo  
cikadoj centobliĝas ĉie kante  
riverencas volumenoj ĉiuloke  
la haŭto de ĉies koloroj senbridiĝas  
Kaj mi per la fingroj disetendaj  
ĝuas la fandiĝon de la ĉielo  
en la maro.

### Lando

Altaj montoj  
altegaj, eĉ  
krutaj  
malebenaj formoj de la vivo, — agloj  
irvagule;  
kruda dolĉo!,  
Perforte ĉiel staras la perrforto:  
tamen, homoj persistas!

## Lenke Szász (Rumanio)



### Metempsikozo

Kiam alvenos la vivfino,  
Kien ekiros la animo?

Ke ĝi neniiĝos samtempe  
Ja por mi estas nekredeble.

Metempsikozo, mia revo—  
Estas postmorte iĝi mevo,  
Flugi super la greka maro—  
Mia granda dumviva amo.

Bluas la eterna ĉielo,  
Brilos sub mi mara senfino.  
Animo ne loĝos en tombo,  
Animo ne fariĝos polvo.

## Aksel Voino (Germanio)



Sidante antaŭ mi, vi legas  
Via haŭto scias, ke mi ĝin rigardas  
De temp' al tempo vi ektemas  
Sub via vualo de sulkoj fajnaj  
Sen rigardi supren vi ridetas  
Dio ! ho Dio, kiel vi estos bela  
Kiam viaj haroj griziĝas ...

### Bestoj

Ĉu mi ŝatas bestojn?  
Ĉu mi ŝatas homojn?  
Ĉu estas fidelaj?  
Ĉu estas amindaj?  
Mi ne povas diri  
Se mi devas pensi  
Ke homo kaj besto  
Vivas en kunsento.  
Ili diferencas.  
Tamen ofte eblas  
Sentemoj tre fortaj  
Unu por l' aliaj.



## Jadranka Miric (Serbio)



### Somera sunsubiro

Aŭgusta tago.  
 Apenaŭ suno subiĝis.  
 Ni apud kvieta lago  
 rigardis dum suno en lago speguliĝis!  
 Diverskoloraj butonoj- ŝtonetaj  
 ĉe kvieta lagobordo.  
 La ĉielaj koloroj laŭ ordo  
 aperis. Jen, blujaj, flavaj kaj ruĝetaj.  
 Fore Rtanj monto bluiĝas.  
 Suno malantaŭe malaperis.  
 Malrapide vesperiĝas.  
 Dume ĉielo apenaŭ oriĝas.

### Frua aŭtuno

Venis ventego tutforte fajfante.  
 La malvarmo nealvokita, forportante  
 velkintan foliaron . Ekploris floretoj.  
 Vekiĝis malĝojo. Larmoj sur  
 okuloharetoj !  
 Sur ĉielo plumba nubaro  
 nek unu brilo de kaŝita stelar' .  
 Malravita mi okule serĉas la lunon.  
 Perdiĝis ĝi , nek matene mi vidis Sunon.  
 Vide al vide la tilio preskaŭ mortinta..  
 Ĝia branĉaro ruĝbruna jam falinta  
 en ŝosea putraĵo transforminta.  
 Unu sezono estos baldaŭ jam pasinta!

### Kiam mortas foliar'

Kuŝiĝis foliar' aŭtuna  
 laŭ velkinta mola herbej' ,  
 mortis pro varmego suna.  
 Disjetitan foliaron,  
 ĉiam diligenta formikar'  
 kunportas sen ajna ĉar' !.  
 Kaj nokto longas  
 helas aŭ nigras  
 kaj malrapide pasas.

## Elena Popova (Bulgario)



### Fajra spirita

*de Bogomil Ĵivkov, skulptisto el Bulgario*

Jen Prometeo,  
 kun aglo surŝultre. Pek'?' –  
 ŝtelis la fajron.

Bonkora Titan'  
 vane koleris l' diojn.  
 Mankas egalec' .

Eva kun pomo –  
 ne elpagita kulpo.  
 Ĉiam sen ino?

Muzika eĥo  
 je Rodopa Montaro –  
 Orfea memor' .

Falas folioj  
 el la Arbo de vivo.  
 Printempo venos.

L' milit' finiĝis  
 kun lambastonoj. Antaŭ  
 li – malluma nokt' .

La amo portas  
 flugilojn nur al duo.  
 Arda pasio.

Varma tero sub  
 nuda Eva. Ĉielo  
 emociiĝas.

Danc' de la korpoj –  
 muziko, ekstazo kaj...  
 forgesita nokt' .

Spirit' kaj korpo –  
 la materio venkas.

L' Spirit' suferas.

Patrin' kaj ido –  
sancta, ĉiama ligo.  
Ĉiela faro.

Nokta ripozo –  
kapo ĉe kapo songe.  
La zorgoj dormas.

Li kaj Ŝi en voj'  
al lumanta espero.  
Proksime kruco.

Birdo kaj ino  
impetaj al la lumo.  
Suna invito.

Muziko sonas –  
sinforges' ĉe piano.  
Luno aŭskultas.

## El Ĉina Antikva Poezio

### Li Qingzhao (1084-1151)

#### —laŭ melodio *Ebrio sub ombro de floroj*

Densaj nuboj kaj nebul' maldensa  
ĉiam kloŝas en taglumo  
super mi kun ĝenaj splenoj.  
En la leon-forma incensujo fumo  
jen spiralas alten kun leĝero.  
Nun okazas Fest' de Duobla Naŭo\*  
de ĉi tiu jaro per kultado en ofero.  
Porcelana kapkuseno,  
gaza kulvualo malvarmiĝas  
en meznokto kun fridflua veno.

Mi vespere trinkis vinon  
ĉe barilo orienta, kie floroj  
krizantemaj pompas,  
sur manikoj miaj bonodoroj  
striaĵ kaŝe elspiriĝas.

Sciu, fakte vere mi ja en sopiro  
al vi ĉiam kun suspiro.  
L' okcidenta vento levas  
pordkurtenon jen kaj jen  
kaj vidigas miajn vangojn  
pli malgrasajn ol flavfloroj en ĝarden'.

\* *La tago estas la naŭa de la naŭa monato laŭ la ĉina lunkalendaro. Dum tiu tago oni kultas al prapatroj kaj dediĉas respekton al maljunuloj.*

#### —laŭ melodio *Flutado sur teraso*

Incensiloj brulis jam ĝis cindro  
en la leonforma incensujo el metalo.  
Ruĝa litkovril' masiĝas onde en la lito  
kaj mi ja malemas fari kombon al hararo.  
La tualettabl' kovriĝas jam per polvo  
ŝajne forlasita en la buduaro.  
La sunlum' filtriĝas kaj prilumas  
jam sur hokojn de la kulvualo.  
Multe da kor-vortoj volas mi elverŝi,  
sed mi ne eldiri pro ĉagrena baro.  
Lastatempe malgrasiĝas mi ostece  
ne pro la drinkado gluta per pokalo,  
nek pro invadado de l' trista vento  
de l' aŭtuno kun susura folifalo.

Lasu do, ve, lasu do!


Eĉ mi kantas fojojn mil kaj mil  
la kanzonon “*La ĉagreno de disiĝo*”,  
mi ne povas vin reteni de forir',  
ĉar vi devas ja plenumi l' devon.  
Mi sopiras al vi kun suspir'  
en malplena mia buduaro.  
Fiksrigardas mi la rojon, sen konsil',  
lirl-fluantan antaŭ la fenestro.  
Ĝi respondas nur al mia maltrankvil'  
pri vi en distanco malproksima.  
Mia spleno des pli kreskas kun kor-tril'.

#### —laŭ melodio *Branĉo da umefloro*

Ruĝaj lotusfloroj velkis  
kaj forsvenis ĝis sen bonodor',  
La bambua mat' elspiras la aŭtunan  
fridon,

kiu mordas min en ĉi-hor'.  
 Mi leĝere ŝanĝas veston  
 al maldika silka robo por  
 remi la boaton sola.  
 Kiu povus sendi al mi vorton  
 per nubero el la for'?'  
 Kiam la sovaĝanser' revenas,  
 jam troviĝas etaĝdomo en lunglor'.

Floroj falas jen laŭplaĉe  
 kaj rivero fluas kontraŭ homa vol'.  
 Sopiremo samas en du lokoj,  
 sed ĉagrenojn vekas sen ignor'.  
 Mi neniel povas min senigi  
 je la spleno de disiĝ-dolor',  
 kiu ĵus vanuis el la frunto  
 kaj nun jam inundas en la kor'.



—laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Sunlum' de l' aŭtuno malvarma  
 surrampas la ŝprosojn jen ŝtele,  
 platan' senfolia malamas lastnoktan  
 blank-prujnon altrudan kruele.  
 Por teni min sobra mi emas  
 trinketi la dikan teakvon ja ebriopele.  
 Se mi, ve, vekigĝas el sonĝo rompita  
 preferas mi fumon incensan  
 pacigi trankvile tenere.

Aŭtun' al la fin' jam aliras,  
 sed same ja longas la tago.  
 Mi vere min sentas pli trista,  
 mizera ol la vagabondo en vago.  
 Volontas mi min ebriigi  
 plaŭplaĉe kun menso en svago,  
 alfronte al flavaj floretoj en pompo  
 ĉe l' heĝ' orienta kun arom-atako.

*elĉinigis*



**Vejdo (Ĉinio)**

**Shi Runzhang (1619 - 1683)**

## Survoje al hejmloko

Ĉe l' ŝtona bordo de sinua fluo  
 malnovaj arboj laŭ la muro staras.  
 Sovagaĝaj rojoj kunas inter montoj,  
 vilaĝon presikfloroj el si faras.  
 Vokitaj kokoj pasas tra verg-heĝo,  
 genepoj l' avon taste nun regalas.  
 Ermito, oldiĝante, mi fariĝos,  
 ĉar monto ja al mia dom' najbaras.

**Shen Deqian (1673 - 1769)**

## Pasi tra Xuzhou

Ĉie fluas freŝa akvo. Vasta je cent lioj  
 kampo per pendantaj plorsalikoj sin nebulas.  
 Brovoj de mi, trapasanto, ŝajnas gaje verdaj;  
 kun ĉirpado de cikadoj mi Xuzhou traveturas.

**Li E (1692 - 1752)**

## La templo Lingyin en luna nokto

En frosta nokto l' templo lume blankas,  
 sinua fluo ĉe la pord' sin movas.  
 La luno lumas super montopintoj;  
 folioj sur ĉi fonta akvo flosas.  
 L' estaĵoj mutas kaj la universo  
 silentas, kiam sola lamp' morozas.  
 Revene mi renkonti tigron timus,  
 ĉar tiam vent' el rokoj jam nervozas.

**Lu Kai (? - ĉ. 504)**

## Dediĉi poemon al Fan Ye

Mi plukas umefloron, por ke sendu  
 al kara mia ĝin la kuriero.  
 Sudlande ja nenio donaceblas,  
 krom frondo kiun benas primavero.

**Xue Daoheng (540 - 609)**

## Nostalgio en ekprintempo

Du jarojn pli frue mi l' hejmon forlasis.  
 Post la ekprintempo sep tagoj jam pasis.  
 Sovaĝaj anseroj norden min antaŭis,  
 sed, antaŭ l' florad', min hejmveo ĉirkaŭis.

## Liu Zihui (1101 - 1147)

### Memoro pri la ĉefurba vivo

Li Sisi, en juneco bonzineto, poste geĵŝo  
 belega, sin prezentis en ĉefurbo vivoplana.  
 Sed bedaŭrinde, ŝi kaj maljuniĝis kaj  
 velkiĝis,

dronante en la vagaborda vivo forte splena.  
 Paliĝis l' orfadena vesto kaj klakilo, kiuj  
 la koron iam ĉarmis de la reĝo fenomena.

*elĉinigis*



**Minosun (Ĉinio)**

## Mile Gojkoviĉ

### KORO DE JOVANO

UĈK-anoj Jovanon kaptis  
 en la domkorto lia.  
 Ili lin kidnapis  
 transportante al fi Flava domo - albania.  
 kie ili la serbojn buĉadis!  
 Ĉiun interan organon ili elprenis  
 de ili, poste multekoste vendadis  
 ien eksterlanden!  
 Eble neniu eksciis  
 ion ili faris al la serboj. Pro vero  
 Dio ĉiam sendas al ni signojn!  
 Iu germano aperis  
 kiel fulmo el klara ĉielo,  
 la domon de Jovano serĉanta.  
 Mi estis Wagner Johano  
 al vojo mi ekiris  
 por ke mi vidu la filon de Jovano!  
 Kiam li atingis la vilaĝon  
 la etulo trakuris la korton  
 plena de koto.

El plena voĉo subite li ekkriis:  
 Venis al mi mia patro!  
 Ĉe Johano koro eksaltis,  
 la vera koro de Jovano forte tiktakis  
 pro malgajo kaj pro feliĉo!  
 Johano ŝanĝis sian kredon,  
 prenis kun si la etulon  
 kiel sian filon.  
 Ne estis ĉi poemo malvero  
 sed la vero vera de Dio viva!

*elserbigis* **Jadranka Miric (Serbio)**

## Mimoza Ahmeti



### Mia krio

Mi mortos,  
 Envane vi min vekiĝi sub ĉi tiu ruĝa arko  
 petas  
 De la malleviĝo  
 Kie la pinarboj brulas,  
 Envane revivigi la duonlumajn  
 hormontrilojn de la sento  
 En ĉi tiu horo.  
 Ĉar mi enfalis, delonge enfalis.  
 Granda, brua, mortigita mi enfalis,  
 Per ruĝa vundo kiun nur mi vidis.  
 Ho, brue, tro brue mi enfalis,  
 Neentombigita mi enfalis,  
 Sur ĉi tiun teron enfalis.

Kaj neniu vidis kie mia ululado enfalis,  
 Neniu aŭdis,  
 Neniu scias kie nun ĝi vagas,  
 Kie mia ululado ululas.  
 Apud vi, freŝa junularo, mi estas,  
 Ambicia, muskoloplana.  
 Vian manon etenditan super mia korpo mi  
 vidas,  
 Vian fortan manon, vian petatan manon,  
 Kaj viajn animlogajn lipojn mi tuŝas kaj



elkore aŭdas.  
Sed ...mi enfalis, mi malrapide estingiĝas,  
Sub la pezo de mia korpo malvarmiĝanta  
De mia sango en la vejnoj glaciiganta,  
Dum mia krio elmigras kaj eĥas,  
Kaj nur por ĝi mi zorgas,  
Dum mi mortas. Ĉu vi ne aŭdas?

## Estis vojo

Estis vojo kie vi senĉese pasis,  
Vi, kara,  
Vi, bela,  
Vi, ekstravaganca,  
La alies ekstravaganca,  
Insultita, humiligita, komplimentita,  
Kiel la historio de valora pentraĵo.

Eĉ mem vi sciis la kialon  
Ke foriris la haroj en libero,  
Dum la piedoj premis en la kadavrejo  
De la kadavrecaj amoj,  
Kiuj kiel ajn havis la manion  
Por ekzameni la urbajn buŝojn.

Nun vi ne estas,  
Nun vi sur la vojo mutiĝanta ne plu paŝas,  
Nek via paŝo,  
Nek via granda korpo,  
Nek via buŝo kun koaguloj  
Je abomeno kaj malŝato.

Tie estas la vojo, tie,  
Kaj via dismetita kadavrejo...  
La kadavroj de la forĵetitaj karuloj  
Sur la maljuniĝintaj borderaĵoj.  
Nun kiam mi pasas tien  
Mi sentas la grandan mankon de via orbito,  
Kaj donas salutojn laŭskeme  
Per malvarmo de la kartono  
Kiun ni por vi respektas.

Por vi, karulino,

Por vi, insultita,  
Por vi, humiligita,  
Kiel la historio de la pentraĵo  
Plej valora.

*Elalbanigis*



**Bardhyl Selimi**

(Albanio)



## Zhuangzi

### ĈAPITRO DUDEK-KVINA

## Xu Wugui

#### §25-13

Shaozhi demandis Taigong Tiao, dirante:

“Kion signifas ‘vilaĝa diro’?”

“La vilaĝo,” respondis Taigong Tiao, “estas kolektiĝo de ĉirkaŭ deko da familioj aŭ ĉirkaŭ centoj da personoj, kiuj havas komunajn konvenciojn. La arigo de diversaj individuoj formas komunumon kaj la komunumo disiĝas en diversajn individuojn. Oni povas vidi cent partojn de ĉevala korpo, sed oni ne povas diri, ke tiuj ĉi partoj estas la ĉevalo mem. Se la ĉevalo estas kondukita antaŭ vin kaj vi kombinas la diversajn partojn en unu tuton, tiu tuto estas la ĉevalo mem. Sammaniere la montoj fariĝas altaj dank’ al la akumuliĝo de siaj malaltaj partoj; la rivero Jangzi kaj la Flava Rivero fariĝas grandaj dank’ al la enfluo de riveretoj; la saĝuloj fariĝas respektegataj dank’ al la kolekto de la spertoj de diversaj individuoj en sin.

“Tial vi povas formi vian propran opinion pri tio, kio eniras en vian menson de ekstere, sed vi ne devas alkraciĝi al via opinio; vi povas esti prava pri tio, kio venas el via menso, sed vi ne devas rifuzi alies opiniojn.

“Ĉiu el la kvar sezonoj havas sian propran temperaturon, sed ĉar la Ĉielo montras apartan favoron al neniu el ili, ili kune kompletigas la jaron. Ĉiu el la kvin ministroj havas siajn proprajn devojn, sed ĉar la suvereno montras apartan favoron al neniu el ili, ili

povas kune regi super la regno. Ĉiu el la regnificistoj civilaj kaj militaj havas siajn kapablojn, sed ĉar la estro montras apartan favoron al neniu el ili, ili perfektigas en sia virto.

“Ĉiu el la estaĵoj en la mondo havas sian propran ekzistokialon, sed ĉar la Taŭo montras apartan favoron al neniu el ili, tial ĝi estas sennoma. Tiu, kiu estas sennoma, faras nenion; tiu, kiu faras nenion, plenumas tamen ĉion.

“La kvar sezonoj havas sian komencon kaj finon; la mondo havas siajn ŝanĝiĝojn kaj transformiĝojn; la malfeliĉoj kaj feliĉoj sin intersekvas. En la strebado al siaj diversaj celoj, la homoj povas esti pravaj aŭ malpravaj. Kiam vi ĵetas rigardon al marĉo, vi vidos diversajn arbojn kun ligno taŭga ĉiu por aparta uzo; kiam vi ĵetas rigardon al monto, vi vidos arbojn kaj rokojn, kiuj kune okupas la saman terpecon. Jen kio estas nomata la vilaĝa diro.”

“Ĉu do oni povas konsideri ĝin kiel la Taŭon?” diris Shaozhi.

“Certe ne,” diris Taigong Tiao. “Ekzistas sennombraj estaĵoj en la mondo. Kiam ni diras “dek mil estaĵoj”, la cifero “dek mil” servas nur por elvoki en ni grandan nombron. Tial, kiel estas dirite, ‘La ĉielo kaj la tero estas la plej grandaj fizikaj formoj; la jino kaj la jango estas la plej fortaj vitalaj energioj; la Taŭo estas la fonto de ĉiuj estaĵoj. Ĝi estas nomata la Taŭo ĝuste pro sia senlimeco, ĉioamplekseco. Kiel do la de vi nomata Taŭo povus esti komparata kun la Taŭo mem? Se ni volas diferencigi ilin, ili estas tiel diferencaj inter si, kiel la hundo kaj la ĉevalo.”

“De kie do naskiĝas la estaĵoj,” diris Shaoqi, “kiuj vivas interne de la kvar direktoj kaj la ses limoj de la spaco?”

“La du vitalaj energioj, nome la jino kaj la jango,” diris Taigong Tiao, “altiras unu la alian, forpuŝas unu la alian kaj reguligas unu la alian. La kvar sezonoj sin sekvas reciproke, sin estigas reciproke kaj sin finas reciproke. La ŝatoj kaj malŝatoj venas kaj foriras, kaj leviĝas kaj falas. La masklo kaj la femalo disiĝas kaj kuniĝas, tiel produktante kaj eternigante la vivon. La sekureco kaj la danĝero alternas reciproke. La malfeliĉo kaj la feliĉo ŝanĝiĝas unu en la alian. La malrapideco kaj rapideco sekvas unu la alian. La

kuniĝo kaj la disiĝo estas rilatigitaj unu al la alia. Tiuj ĉi nomoj kaj la efektivoj povas esti notitaj, kaj iliaj apartaĵoj povas esti konfirmitaj. La intersekvo en la kronologia ordo, kaj la alternado de movoj (la returno post atingo de la limo, la rekomenco post atingo de la fino) — tiuj estas la universalaj leĝoj de ĉiuj estaĵoj en la mondo. Ĉio, kion la paroloj povas ampleksi, kaj ĉio, kion la inteligenteco povas atingi, estas limigitaj ekskluzive nur al la kategorio de la estaĵoj en la mondo. La sekvantoj de la Taŭo ne penas serĉi la komencon kaj la finon de la estaĵoj. Jen kie haltas ĉiaj diskutoj.”

“Ji Zhen opinias, ke nenio kreis la mondon; Jiezi opinias, ke io mistera kreis la mondon. Kiu el la du opinioj estas konforma al la vero?” diris Shaozhi.

“La koko krias kaj la hundo bojas — tio estas konata al ĉiuj,” diris Taigong Tiao. “Sed eĉ la plej saĝa el ni ne scias kial la koko krias kaj la hundo bojas, nek povas antaŭvidi, kio ili fariĝos en la estonteco. La analizado de la kaŭzoj kaj la efikoj kondukas al pensado, ke la malgranda povas esti senkompare malgrandega, kaj la granda povas esti neimageble grandega. Tute egale, ĉu ni diras, ke nenio kreis la mondon aŭ ke io mistera kreis la mondon, ni estas en efektiveco limigita al “estaĵoj” kaj neeviteble falos en eraron. La opinio, ke io mistera kreis la mondon, estas opinio tro realeca, dum la opinio, ke nenio kreis la mondon, estas opinio tro malpleneca. Kiam ni parolas pri la nomo kaj la formo, ni parolas pri la materia ekzistado; kiam ni parolas pri la sennomeco kaj la senformeco, ni parolas pri la nemateria ekzistado. Ni povas esprimi per vortoj aŭ formi en nia menso ideojn, sed ju pli ni esprimas per vortoj, des pli fore ni estas de la vero.

“Ni ne povas malebligi al io naskiĝi, nek al io morti. La vivo kaj la morto ne estas malproksime unu de la alia, sed la leĝo, al kiu ili estas submetitaj, estas super nia kompreno. La opinio, ke io mistera kreis la mondon kaj la opinio, ke nenio kreis la mondon, estas nur supozo naskita el dubo.

“Kiam ni penas eltrovi la fonton de la mondo, ni retrospuris ĝis la senfineco; kiam ni penas eltrovi la finon de la mondo, ni konstatas ankaŭ la senfinecon. La du senfinecoj superas ĉian esprimeblon per vortoj. La sama leĝo regas ĉiujn estaĵojn en la mondo. La opinio,

ke io mistera kreis la mondon kaj la opinio, ke nenio kreis la mondon, estas bazita sur la paroloj; ili komenciĝas kaj finiĝas kun la ‘estaĵoj’. La Taŭo estas senforma, sed ĝi ne estas nenieco. La nomo Taŭo estas adoptita de ni nur por praktika celo. La du opinioj supre menciitaj estas limigitaj al la ‘estaĵoj’. Kiel do ili povus ĝeneraligi la Taŭon mem? Se ni parolas adekvate, ni tiam parolas pri la Taŭo la tutajn tagojn; se ni parolas ne adekvate, ni tiam parolas nur pri estaĵoj la tutajn tagojn.

“La Taŭo, la perfekta stato de la estaĵoj, povas esti komunikata nek per parolo, nek per silento. La plej alta formo de diskutado estas farata kiel sen parolo, tiel ankaŭ sen silento.”

*Elĉinigi*



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

# Ĉineske

**Jadranka Miric (Serbio)**

## Pigo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Aŭgusta  
vetero plaĉas.  
Tage tre suna, nokte  
tre freŝa sed tre mildas,  
aer’agrables!

Rigardis  
mi pigojn. La par’  
faris neston. Panjeto  
kovas dum flugas birdar’  
Ĝi sen amikar’.

Tage sun’  
brulas. Sufokas  
aer’. Pigo ne plendas.

Pace sorton eltenas.

Mi ĝin admiras!

Vespere

aŭdiĝas pigoj!

Kvazaŭ festus post varmo.

Viglaĵoj tre laŭtaj .

Koncertas pigoj!

Mi ĉiam

miras pri ili.

Kiam venos ido ĉu

kune restos famili’?

Malpli multepli!

## Urga helpo al montaranoj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Foliar’

flaviĝis. Iuj

jam kuŝis sur velkinta

herbejo. Surstrata uj’

Manĝo al ĉiuj!

Formikoj

sube , birdetoj

supre serĉantaj manĝojn.

La gril’ ĉe rivereto .

eĥis kantetoj.

Ankoraŭ

somerumas gril’.

La tagoj mallongiĝis.

Aperis surĉiel’ mil’

da fi-nubkovril’.

Malofte

pluvis. Seka ter’

bezonas akvon. Bestoj

estas en granda danĝer’ !

Helpu ni al ter’!

Soldatoj

kaj bona homar’

kunagiĝis tre sukcese!

